

esperanto USA

1993(3)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

Making News This Issue

New Director

As of the beginning of August the Central Office of ELNA has a new Director. His name is Miko Sloper. In this issue he gives us a look at his background and at a few of his many ideas.

See Page 4

Our Future

In his keynote address to the 41st ELNA Congress in Hartford, CT, Prof. Humphrey Tonkin discussed Esperanto's goals and some of the problems that confront us on our way to those goals. In this issue we reprint this important speech.

See Page 7-9

Everyday Esperanto

The theme of this year's ELNA Congress was "Esperanto in Daily Life." In this issue Canadian Esperantist Zdravka Metz describes how she and her family use Esperanto in their daily lives.

See Page 11-12

In This Issue:

The Old President Speaks 6

The New President Speaks 9-11

USEJ News 14

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

41a ELNA Jarkongreso

Mi Ĉeestis ELNA Kongreson

de Zdravka Metz

Ĉijare ELNA kongreso estis organizita por pluraj paroprenantoj survoje al UK en Valencio. Ĝi okazis inter 17-a kaj 20-a de julio en urbo Hartford.

La Universitato Hartford gastigis la kongreson kun temo "Esperanto en ĉiutaga vivo". La kongreso okazis tuj post la finitaj someraj kursoj de la Universitato. Pro tio la solena malfermo komenciĝis per disdonado de diplomoj al kursanoj kaj per malferma parolado de la prezidanto de la Universitato, d-ro Humphrey Tonkin.

Danke al s-ro Tonkin, kaj someraj kursoj kaj ELNA kongreso povis okazi ĉe la Universitato. La malferma parolado estis agrabla ne nur por oreloj sed ankaŭ por animo de ĉiu aktivulo. S-ro Tonkin parolis pri graveco de Esperanto en hodiaŭa mondo, pri ĝia valoro kaj pri respondeco de ĉiu esperantisto por laboro en la movado.

Esperanto en lernejon, rokmuziko en Esperanto, konversacia rondo, Bahaa-movado, virina movado, maldeci Esperante, distra vespero, bankedo, estis nur kelkaj el programeroj kiujn povis ĉeesti ĉirkaŭ 80 partoprenantoj.

Apartan atenton havis dimanĉa posttagmeza prelego de Mark Fettes el Otavo, Kanado, pri strategio de Esperanto-movado, kion fari por kaj per Esperanto en hodiaŭa mondo de diversspeca komunikado kaj ekzisto de lingvaj problemoj.

Spomenka Štimec el Zagrebo, Kroatio, estis alia gasto de la kongreso. Kun ŝi oni povis diskuti dum konversacia rondo kaj en libera tempo, oni povis aŭdi ŝin sur scenejo dum kultura vespero kiam ŝi

informplene anoncis programerojn, legis poemon el de ŝi preparita libro *Izolulo* kaj eĉ kantis kroatajn kaj aliajn kantojn. Sur scenejo ŝi aperis kiam ŝi parolis pri uzo de ĉiutaga lingvo en ŝiaj verkoj kaj same kiam ŝi prezentis sian landon kaj nunan militon el la libro *Geografio de miaj memoroj*. Unuvorte multon oni lernis de ŝi kaj pri ŝi kiel Esperanta verkistino de libroj.

Normando [Fleury] kaj mi ricevis plurajn laŭdojn post nia prezento pri ĉiutaga uzado de Esperanto. Komence mi parolis pri trilingva edukado de Damir kaj Mira kaj pri diversspecaj spertoj kiujn ni havis dum tiuj preskaŭ dek jaroj de komunikado kun infanoj. Normando rakontis pri malfacilaĵoj pro manko de fakaj vortoj kaj foja kreo de novaj vortoj. Al tiu parolado aliĝis William Harmon el Usono, kiu parolis pri sia sperto de uzo de Esperanto en Japanio.

Pri originala ĉiutaga kasedforma komunikado en Montrealo rakontis Patriko Monĵoa. Liarepondilo PAPAGO ligita per komputilo ebligas telefonan diskutadon. Provu ankaŭ vi voki (514) 270-0054.

Dum ĉi tiu mateno mi rigardis niajn infanojn kiuj ne nur atente aŭskultis ĉiun vorton sed eĉ foje emis korekti se mi ne diris ion ĝuste pri ili. Ŝajnis al mi kvazaŭ ili sentis sin en sia mondo, sia natura kulturo. Facile ili akceptis reciti al publiko, kanti kun publiko kaj aparte helpi kaj ĝoji dum ludo-programeroj. Pleje ili amikiĝis kun kelkaj junuloj kiuj emis pli ludi kaj postkuri ilin.

Dum ĉi tiu kongreso estis ankaŭ elektita nova estraro. Nova prezidanto de ELNA

Daŭrigo sur paĝo 6

EDITORIAL

THE ONLY GAME FOR GROWNUPS

That's what late Robert A. Heinlein, the science-fiction author, once called politics. Well, those of us who are grownups can probably think of at least one other ... but I think Heinlein really was on the track of at least part of a universal truth. Of course, Heinlein was talking about party politics in the United States—but there's an even greater and more interesting politics in the world.

This has been a political year. Bill Clinton was elected president of the United States ... and I was elected president of ELNA. I can think of four different schools of thought that might arise from this juxtaposition ... but right now I'd rather talk about politics in more general and wider terms, as they relate to Esperanto and ELNA.

The Esperanto movement has long prided itself on its "neutrality" with respect to the great divisive questions that have troubled our world at least since I've been cognizant of it—and probably before that, too. The *Universala Esperanto-Asocio* has build neutrality into its basic rules, and our own Constitution includes, as part of its preamble: "The League is and shall forever remain neutral concerning questions of religion, politics, and socio-economic theory."

That third entry may seem a little bit dated today; Adam Smith has gained the ascendancy (temporarily, anyway) in his ongoing global struggle with Karl Marx. But there were good reasons for adding it back when ELNA was busy being born, some forty-odd years ago; at that time, if you wanted to avoid at least a low level of persecution in this country, you were absolutely forbidden from supporting one side in that struggle, and "neutrality" seemed like a reasonable compromise option.

Is there any reason to keep on being "neutral" with respect to religion, politics, and socio-economic theory? The best in the world, I think. ELNA exists to (again from the Preamble) "further education in, and dissemination of information about, the international auxiliary language Esperanto within the United States of America." And whom do we want to educate, and to whom do we want to disseminate infor-

mation? In effect, everybody—Americans of all religious, political, and socio-economic stripes. We are, and we exist for the benefit of, Jews and Catholics and Moslems and Baha'is, Republicans and Democrats and Socialists and Libertarians, blacks and whites and browns, those who swear by Friedrich Engels and those who swear by the Laffer Curve. Put it another way: Are we pro-life or pro-choice? Yes. Are we right-wing or left-wing? Yes. Are we capitalists or communists? Yes.

Which means that on any of those great divisive questions that you can think of, to take any particular position as an organization would enthuse some of our members and anger others. So we won't. You may be pro-choice and I may be pro-life; ELNA will remain blithely disinterested. You may vote for Pat Buchanan and I may vote for Jerry Brown; ELNA will not visit the polling booth. You may cry about the glories of the market, while I may preach of social responsibility; ELNA will continue to distribute free information as a social service while it sells books at a (slight) profit from its book service. None of these ideas are ELNA's business. ELNA's business is Esperanto.

Now you may be able to think of one exception to this: the question of language. "Language," someone once said, "is political dynamite!" And it's a stick of dynamite that it's our job to handle ... isn't it? Well ... sometimes ... maybe ...

There are many burning language questions in the United States today. Should English be our official language? Should it be the official language of the separate states? Should the use of other languages be discouraged or even suppressed? What about bilingual education? What languages should be taught in our public schools? Should foreign languages even be taught?

Well ... I suppose that ELNA can safely say that Esperanto should be taught in our public schools. Hopefully, we all agree on that. But as an elective, or as a mandatory subject? At this point, I think we might start encountering some difference of opinion, even among ourselves. Maybe we shouldn't go any further along those lines.

And the other questions? Esperanto has little or nothing to do with bilingual edu-

cation. The use of languages other than English relates to such varied questions as cultural values and the need to adapt to the society in which one lives. And as to the question of an official language (English)—for myself, my gut says "no," but my brain says that a person who argues for a common language for the entire world can't very consistently argue against a common language for a single country ...

So, with very few exceptions, ELNA is and will remain neutral.

On the other hand ...

Someone once said that for evil to prevail, it is enough for good folk to do nothing. The old interbellum UEA found that out in the 1930's; it adopted a head-in-the-sand sort of neutrality, struggling in its European heartland to stand on common ground between two very different sociopolitical philosophies. Turned out that there was no common ground on which to stand; the most successful figure to emerge in the Esperanto world from that period—Ivo Lapenna, of the Student Esperanto Club in Zagreb—was precisely the one person who refused to compromise with what he saw as unmitigated evil. Lapenna *did something*.

Maybe ELNA, like UEA, must by its very nature put its head in the sand. But the individual members of ELNA do not have to do so. We, more than one thousand of us, have a tool that others lack—a language that gives us the chance to get into direct contact with people all over the world. We have the opportunity to use that tool to increase our store of knowledge of what the real facts are behind all those great divisive questions that shake the world. How we interpret those facts may differ from individual to individual, but at least the interpretations will be our own; we won't be dependent on CBS or the *New York Times* for everything we know about the world.

You are learning or already speak Esperanto. ELNA will remain neutral; but now you as an individual have the ability go beyond neutrality and make new choices—and take part in the only game for grownups.

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

In the *World Citizen News* (July/August 1992) there is a double comic strip labeled "Which gathering is speaking ESPERANTO, the mother tongue of world peace?!" (sent by Detelina Kalaidzhieva)

In the stimulating work *When Time Shall Be No More—Prophecy Belief in Modern American Culture* by Paul Boyer (1992), there is a reference to Esperanto as being cited by Isaac Haldeman in 1910 (*The Signs of the Times*). Haldeman saw Esperanto as "a plot to promote globalism." The one-world conspiracy was to be feared, but paradoxically was to be welcomed as part of End Time prophecy. (report provided by Rob Hardy)

We've had Esperanto questions on *Jeopardy* before, but never like this (April 8, 1993)! On that date, the popular quiz program devoted an entire category to Esperanto. Questions (which on *Jeopardy* are actually answers) were as follows: "In Esperanto, this breakfast meat is called 'lardo'" (\$100); "This disease is called 'astmo'" (\$200); "The Esperanto name for this European country is 'Svedujo'" (\$300); "If a mechanic asks you about your 'karburilo,' he wants to see this part of your car" (\$400); "'Merkredo' is the Esperanto name for this day of the week" (\$500). See? You could have won \$1500 if you'd been there! (reported by J. Theodore Schuerzinger)

Andrew Ferguson, writing in the *National Review* (April 12, 1993), advises us that "members of the [rock 'n' roll] community ... supported [Governor Bill] Clinton with an ardor matched only by the Esperanto-speaking and clothing-optional communities." Please excuse the editor of *esperanto usa* for somehow missing the poll that provided this information to Mr. Ferguson. (reported by Mike Donohoo)

An interview with Russian world citizen Evgueni Ivanovich Lapinski by the World Service Association's eastern European specialist Detelina Kalaidzhieva

appeared in *World Citizen News* (April, 1993). While the interview does not discuss Esperanto or the language question, an Esperanto version appears elsewhere in the magazine; WSA supports and, for some purposes, uses Esperanto in its work. (Ms. Kalaidzhieva, known to Esperantists in the eastern USA as Detelina Dale, is a fluent Esperanto speaker and member of ELNA.) (sent by Detelina Kalaidzhieva)

"Esperanto fans still push 'international' language," according to an article in a newspaper in Thunder Bay, ONT, Canada (July 7, 1993). The article quotes Canadian Esperantists Kim Keeble, Reni Porter and Dr. Stevens Norvell and describes the language and some of its literature. One or two negative comments are added to the last two paragraphs of this fifteen-paragraph article, presumably for "balance." The article is datelined "Halifax," and appears to be taken from the CP newsagency wire. (sent by Paul Hopkins)

Naomi Lakritz, feature writer for the *Winnipeg, MAN, Canada Sun* (July 10, 1993), finds herself confronted by "Esti or not esti, Esperanto poser," when she describes Esperanto through the medium of long-time Winnipeg Esperantists Lilian and Kenneth McIlwain of Winnipeg. The article also quotes Esperantists Kim Keeble of Upper Rawdon, Nova Scotia, and Dr. John Guilfoyle of Winnipeg. (sent by Paul Hopkins)

Michael R. Albino, in a letter to the editor of an unnamed San Diego, CA, area paper (July 12, 1993), recommends Esperanto as a means of overcoming the language barrier. (sent by Frank Helmuth)

Steve Starger, Staff Writer for the *Manchester, CT, Journal Inquirer* (July 16, 1993), describes Esperanto as "the language of peace" in his article about Esperanto and this year's ELNA Congress. The article is largely based on an interview with new ELNA Vice-President Sherry Wells, and speaks of Wells'

presentation about Esperanto before the Manchester Unitarian Universalist Society. (provided by Humphrey Tonkin)

Esperanto is "A foreign language common to all," says Van-Alden Ferguson, Staff Writer for the *Hartford, CT, Courant* (July 19, 1993), in an article published in conjunction with this year's ELNA Congress in Hartford. The article describes Esperanto and its history, and liberally quotes Esperantist luminaries Grant Goodall, Mark Fettes, Thomas Eccardt, Jerald Veit, and Daniel Cuthbert. (provided by Humphrey Tonkin and Jerry Veit)

According to unconfirmed reports from a member of the University of Hartford staff, local TV-station WFSB reported on Esperanto twice during its morning news broadcasts on July 19, 1993. (passed on to us by Jerry Veit)

"Esperanto Spoken Here," advertises Jayne Keedle in the *Hartford, CT, Advocate* (July 22, 1993). Inspired by the recent ELNA Congress in Hartford, Keedle tells something about the history of the language and the way it's used, quoting Esperantists William F. Orr and Humphrey Tonkin. Keedle finishes the article with a list of "important" phrases in Esperanto. (sent by Jerry Veit)

Doug McClellan of the Los Angeles, CA, *Times* (July 29, 1993) reports on Esperanto in Ventura County, CA, at some length, with special emphasis on long-time Esperantist Myron Bondelid. The article quotes Bondelid on Esperanto in computer translation, and also quotes Esperantists Elwin Reed and Scott Smith. (sent by Leah S. Goldberg)

The magazine *Insights on Global Ethics* (July, 1993) carries a letter from ELNA member Prenda Cook, in answer to an earlier article, pointing out the advantages of Esperanto as "an international handshake." The letter includes ELNA's toll-free number. (sent by Prenda Cook)

R. Kent Jones responded to the call by William Vendley, secretary general of the World Council on Religion and Peace, for "a shared common language ... a

Daŭrigo sur paĝo 6

EL LA CENTRA OFICEJO

Dear Members of ELNA!

I greet you as your new servant, for I have recently been honored with the title and duties of Director of the Central Office of ELNA. I view the position largely as a full-time commitment to the cause of international communication, in service to which I shall labor on behalf of any person or group utilizing Esperanto. My primary responsibility is to you as individual members of the Esperanto League for North America, but I shall also be actively involved with local & regional clubs, and with international organizations, especially the Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Perhaps some of you will be curious about who I am and how I came to be involved in the Esperanto movement. So please allow me to recount a few formative events which lead me to a commitment to the International Language.

I was born and raised in the cosmopolitan city of San Francisco, where I absorbed the broadly optimistic outlook which permeated the Sixties. The slogans of the time—"Give peace a chance" "We can change the world"—reflected the idealistic hope which had not yet been shattered nor roundly caricatured. I remember the excitement of the Prague Spring of 1968. Even though this popular revolution was eventually crushed, I knew that it was just a matter of time before the Czech people won their freedom from authoritarianism. (Of course, I didn't think it would take 21 years!) I participated in the first "Earth Day" festival in Davis CA in 1970. At college I studied several languages (German, French and Ancient Greek) while majoring in philosophy. During my eight years teaching high school, I always included World Literature in my English classes, while my history classes studied the U.N. constitution and the Declaration of Human Rights.

In short, I have always been an internationalist. So it was only natural that I should be attracted to the "internal idea" of Esperanto. It is unfortunate that I only

learned of the existence of Zamenhof's creation during the centennial year, when *Time* magazine published a short bilingual statement of the history and nature of Esperanto. I intend to make more people aware of the accomplishments and potential of the International Language, so that others who hope for peace and improved international relations can recognise the proper vehicle for that hope. Too many people know too little about Esperanto. Let us work together to end that ignorance!

We North Americans live far from the center of Esperantio (Esperanto-land). Most of us live within a huge country with a single dominant language. Those who reside in or visit our neighboring countries to the north and south, Canada and Mexico, understand something about the depth of modern language problems; and yet they see but little application of the International Language. We all must work at utilizing Esperanto, for we have but little access to the regular international events which have long been common in Europe, and recently have been occurring with greater frequency in Asia.

Specifically how can we North Americans become more involved in the Esperanto movement? It's actually easy—read, write, speak and listen to Esperanto as much as possible. This utilization will encourage you to *think* in the international language, and will automatically lead to the other parts of the triad contained in the UEA slogan for the second century of Esperanto—*Disvastigo, Utiligo, Edukado* (DUE).

I encourage you to take seriously your potential daily usage of the language. Instead of reading piles of magazines in English or Spanish, why not discover the Esperanto news magazines? Instead of watching American television shows for entertainment, consider reading Esperanto novels or short stories. The book service here at the Central Office offers a wide range of reading material, personally chosen by the Vice Director Ionel Onet. Send letters to penpals or

editors, or write Esperanto poetry or even novels! Have you ever bought tapes from the ELNA Tape Service (c/o Jim Deer, 11905 SW Settler Way, Beaverton OR 97005)? How often do you listen to them? Consider buying some more! Do you have a shortwave radio to listen to Esperanto broadcasts from abroad? (Most of you "ham" radio enthusiasts already have ready access to this. Write me for details of frequencies and times!) When you travel abroad, use the delegate network or Pasporta Servo. And don't forget the telephone: you can find other ELNA members' phone numbers in the membership list.

At the beginning of November you will receive membership and magazine subscription forms from us here at the ELNA Central Office. This will be a perfect opportunity to increase your degree of involvement with Esperanto. Consider joining UEA this year! Their monthly periodical, *Esperanto*, is among the most important for anyone who uses the language. Consider subscribing to a few more periodicals than usual. If you buy more, you will likely read more.

In *Esperanto USA* you can always find penpals in the section called "Volas korespondi." I have found that written correspondence is the most direct and entertaining use of Esperanto which is available to anyone regardless of location. I encourage you to write more letters; you will then have the pleasure of receiving more letters! You will also make new friends.


What else can we do to facilitate your involvement with the International Language? Remember that my job here is to help you; never hesitate to write or call me with questions or suggestions.

Sincerely yours,

Miko SLOPER

Director, ELNA's Central Office

P.S.—A recent development here at the Central Office has been the introduction of an electronic mail account. We can be reached at the following address: elna@netcom.com where we shall always welcome your correspondence!



ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Se vi emas pioniri Esperanton, mi helpos vin. Usona enmigrada advokato sen- aŭ malmultekoste helpos vin se vi havas varman, helpeman personecon kaj kapablas kaj sincere volas okazigadi Esperanton apud Vaŝingtono, D.C. Lokaj lernejoj instruas Esperanton al 140 altinteligentaj gestudentoj jare kiel enkonduko al fremdaj lingvoj—ebla modelo tra Usono, kaj (jen mia Granda Strategio), se unue Usono, poste la mondo. Por iĝi, do, spirita heroo kaj vera pioniro por nia lingvo, sendu informon

pri vi kaj via enmigrada situacio al John Dale, POB 9182, McLean VA 22101, Usono, tel. 1-703-845-1919, fakso 1-703-820-2529.

Kuneldonanto de histori-literatura almanako La Tomahako (pri nordamerikaj indianoj) bonvenigas ĉiutemajn materialojn pri indianoj: rilatoj inter indianoj kaj blankuloj, historio de la koloniigo de Usono, religioj de la indiĝenoj, ŝamanismo, esoteraj scioj, spirita vivo, etnohistorio ktp. Kontakto: **Anatolo SIDOROV, RUS-167031 Komi, SYKTYVKAR, a/k-1316, Rusio.**

Esperantistoj de Usono, kiuj volas viziti urbon Sankt-Peterburgo en Rusio laŭ invito de familio, kun loĝado, nutrado, vizito de muzeoj, konatiĝi kun

urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj kun vivo en Rusio, kaj ĉi tio kontraŭ sufiĉe modesta pago, skribu pri sia deziro al s-ro **ARISTARHOV K. Ju., ST.-PETERBURGO, poŝtako, 190000, Rusio, tel. 314-17-52.** Adreso kaj telefono validas ankaŭ por neesperantistoj, kiuj dum proksima tempo vizitos St.-Peterburgon kaj bezonos loĝadon kaj nutradon.

La Elektronika Afijejo Satronics TBBS en Philadelphia, PA, serĉas komputilistojn en la regiono (215) por helpi starigi kromrealan komunumon por tiuj interesitaj pri Esperanto. Dosierujo jam entenas dekojn da dosieroj, lernhelpiloj kaj programoj (Mac & IBM). Oni atingas la afiŝojn per 1-215-464-3562 (300-2400 b/s) kaj 1-215-698-1905 (9600, 14.4K V.32, V.42 b/s). Por informoj: **Mark F. Miller, telekopie ĉe 1-215-464-3561, interrete ĉe ieif36g@tjuvm.tju.edu, Compuserve ĉe 76702,1127, kaj afiŝeje ĉe 1-215-698-1905.**

KELKAJ PENSOJ POST LA 41-A JARKONGRESO DE ELNA

de Ronald J. Glossop

[Ron Glossop, multjara ELNAano kaj Profesoro pri Paco-Studoj ĉe la Universitato de Suda Ilinojso (Edwardsville), estas ankaŭ la Unua Vicprezidanto de la Asocio de Mondfederistoj, kaj lastatempe aperigis novan libron World Federation? A Critical Analysis of Federal World Government (McFarland & Co., Box 611, Jefferson NC 28640, 226 p., \$28 + \$2 sendkosto). Ron estas ankaŭ vicprezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.]

1. Ĉiu lingvo devas esti la lingvo de iu komunumo.
2. Esperanto estas lingvo de la tutmonda (aŭ "tergloba") komunumo.
3. En ĉiu komunumo oni devas eduki la loĝantaron pri la uzo de la komunuma lingvo.
4. Estas pli facile eduki la infanojn kaj junulojn uzi la lingvon ol eduki la pli

aĝajn personojn.

5. Se oni volus instigi la infanojn kaj junulojn lerni kaj fakte uzi la lingvon, tiuj infanoj kaj junuloj devus loĝi en komunumo aŭ komunumeto kiu vere uzas la lingvon.
6. Tre bona situacio okazas kiam la familio estas komunumeto kiu ofte kaj daŭre uzas Esperanton.
7. Se infanoj kaj junuloj ne estas anoj de Esperanta familio, oni devus krei ĉiutagan Esperantan komunumeton en la klasĉambro aŭ alia medio de la infanoj aŭ junuloj. Sekve, la gvidanto de la komunumeto devus esti tre sperta Esperantisto kiu preskaŭ ĉiam uzas Esperanton en la komunumeto kaj kiu preskaŭ neniam uzas alian lingvon.
8. Se ne estus sufiĉe da spertaj Esperantistaj gvidantoj, eble per televido kaj moderna komunik-teknologio oni povus krei tutmondan kvazaŭ komunumon, sed ĉe tio necesas

ke la spektantoj ankaŭ partoprenu aktive, aŭ elektronike aŭ vidalvide kun aliaj spektantoj, por ke ili vere iĝu anoj de la kvazaŭ-komunumo.

9. Por instigi la daŭran lernadon de Esperanto devas ekzisti kelkaj vere valoraj spertoj per la uzo de la lingvo por la anoj de la koncerna Esperanta komunumo, kiel vojaĝado, tendarado, amuzado, kantado, komunikado kun foraj personoj, konatiĝado kun novaj amikoj, gajnado de novaj informoj, korespondado kun interesaj personoj kiuj uzas malsaman nacian lingvon, kaj tiel plu.
10. Rilate al la edukado de niaj infanoj kaj junuloj pri Esperanto, oni devas memori ke ili bezonas ne nur scipovon de la lingvo sed ankaŭ la ŝaton de la interna ideo de monda familio loĝanta kune kiel amikoj en nia tergloba komunumo.

NOVAĴOJ DE LA PREZIDANTO

de Angela A. Harlow

Jen la fina novaĵletero de mia prezidanteco. Mi volas danki al ĉiu el vi pro via subteno al mi kaj al la Esperantomovado. Nun venis mia vico por ekŝiĝi kiel Prezidanto, kaj unu el miaj finaj plezuroj estas prezenti al vi la nove elektitajn funkciojn

PREZIDANTO—DONALD J. HARLOW

VIC-PREZIDANTO—SHERRY A. WELLS

ESTRARANOJ—DEREK ROFF, DAVID RICHARDSON, DOROTHY HOLLAND-KAUPP

BONVENON AL VI, ELEKTITAJ ESTRARANOJ!!!!

Ni ĝuis pli grandan elcenton da balotantoj en ĉi tiu balotado ol antaŭe; voĉdonis 404 personoj! El tiuj, 65 estas nevalidaj balotiloj (63 ne havis la necesan internan vakan koverton, 2 ne havis la nomon de la balotanto sur la ekstera koverto). Malgraŭ la nevalidaj balotiloj, ni havis bonan proporcion, kaj ni estis tre kontentaj, vidante tiel bonan balotadon. DANKON, KAJ DAŬRE BALOTADU ESTONTECE—GRAVAS ĈIU VOĈO!

Mi ankaŭ volas ĝisi kaj DANKI ALLA ESTRARANOJ kiuj servis dum la tri pasintaj jaroj. Ili ĉiuj forte laboris kiel Estraranoj, kaj ni sentos ilian mankon.

VIC-PREZIDANTO GRANT GOODALL

ESTRARANOJ JIM LIEBERMAN, DAVID WOLFF...

kaj al SHERRY WELLS, nia nova Vic-Prezidanto. Gratulojn!

La Estro de la Kandidatiga Komitato por 1994 estas DONALD COLEMAN. Ni esperas, ke vi rekomendos al li la nomojn de personoj, kiuj laŭ vi estus taŭgaj kandidatoj por la Estraro en nia venontjara balotado (Kasisto kaj tri Estraranoj). Ni DANKAS al Prenda Cook, Nancee Medrano, Natalie Sera, Ron Glossop kaj Don Coleman pro la bone farita tasko, kiun ili plenumis en la pasintjara Kandidatiga Komitato.

NI HAVAS NOVAN DIREKTORON DE LA CENTRA OFICEJO. Lia nomo estas MICHAEL SLOPER (MIKO). Li venas de la Sanfranciska Golfa Regiono. Antaŭ ol li venis al ni, li estis instruisto; li konas komputilojn, bone parolas Esperanton, kaj jam estis studento en la kursoj ĉe San Francisco State University

kaj University of California (Berkeley). Li konas pluraj Estraranoj kaj aliajn personojn, kiuj, parolinte kun li, opiniis, ke li estos bona Direktoro por la Centra Oficejo. Je mia rekomendo, ni dungis lin, kaj li komencis labori je la 1a de aŭgusto 1993. BONVENON, MIKO!

Ni volas danki al Mike Donohoo, kiu jam preskaŭ tri jarojn estis nia Direktoro de la C.O.; post instruado al Miko, li foriros fine de septembro. MIKE, ni deziras al vi sukcesan vivon kaj ĉion bonan. ĜIS, MIKE! KAJ BONAN ŜANCON!

NIA 42A ELNA JARKONGRESO (1994) OKAZOS EN SACRAMENTO, CA. Por tiuj el vi, kiuj maltrafis la ĉijaran kongreson (nian 41 an) en la Universitato de Hartford, CT, okazis tre bela, bone aranĝita, internacia kunveno. DANKEGON al Tom Eccardt, Lusi Harmon, Humphrey Tonkin, Jerry Veit, kaj multaj aliaj, kiuj forte laboris por sukcesigi la konferencon ... Kontrolu en *esperanto usa* por novaĵoj pri la venonta...

Miaflanke, mi foriras de tasko, kiu alportis al mi multajn defiojn, novajn geamikojn, batalojn, novajn ideojn; kaj la lastaj monatoj klarigis al mi, kiom Esperanto gravas por mi. Helpe de la Estraranoj, Komisiitoj, Mike kaj Ionel, ni komencis ŝanĝi ELNAn por esti pli profesie prezentata kaj pli alirebla pere de la elektronika mondo. Mi intencas ankoraŭ volonti min por taskoj en nia regiono, kaj restas unu-du terenoj, sur kiuj mi volas labori; do mi restos aktiva, kaj finfine oni povas denove koni min kiel sinon Donald Harlow. SED, kio ajn okazos nun, *estis por mi tre granda honoro esti elektita kiel la Unua Prezidantino de ELNA.*

Ne necesas mencii, ke sen via subtenado ni tute ne povus ekzisti. Ne gravas, ĉu via kontribuo estas mondonaco, volontula laboro, instruado, estrado de loka grupo, informado pri Esperanto, vizitado en kunvenoj, aĉetado de libro, aŭ provizi liton kaj tegmenton dumnoktajn por vizitana esperantisto, **tio ja helpas ESPERANTON**, kaj mi aparte volas danki al vi pro tio, ke vi estas parto de la Familio.

SINCERE KAJ SAMIDEANE
ANGELA A. HARLOW
Prezidanto de ELNA

Daŭrigo de paĝo 1

estas Don Harlow. Aliaj personoj en la komitato estas: vic-prezidanto Sherry Wells, Estraranoj Doroteo Holland, David Richardson kaj Derek Roff. Kongresanoj dankis al prezidantino Anĝela pro ŝia bona laboro kaj al Grant Goodall kiu estis vic-prezidanto.

Kongreson fermis eksprezidantino Anĝelakun la konkludo ke ĉi tiu kongreso estis tre internacia danke al eksterlandaj partoprenantoj kaj kun deziro ke organizantoj provu daŭre internaciigi la kongreson ĉar tiel por ĉiu partoprenanto ne nur estas pli interesa sed ankaŭ ĉiu sentas pli da senco por la praktiko de la internacia lingvo.

Kongresanoj povis kune ekskursi en mardo posttagmeze en urbon Mystic kie okazis vizito al belega muzeo—vilaĝo de fiŝkaptistoj kaj ŝipkonstruantoj. Tie eblis viziti malnovstilajn domojn kun diversaj antikvaĵoj, velŝipojn, malnovajn vendejojn kun siatempaj produktoj.

ELNA-kongreson oni povus kelkvorte priskribi kiel sukcesan, kontentigan kaj agrablan.

Daŭrigo de paĝo 3

neutral language, not a sectarian language” at the recent Parliament of the World’s Religions in Chicago with a letter to the Chicago, IL, *Tribune* (Sep. 15, 1993) advising of the availability of Esperanto. (sent by R. Kent Jones)

The Mongol Messenger (undated), which describes itself as Mongolia’s “first and only English weekly,” carries an article about Esperanto in Mongolia by Luvsangiin Enhtuvshin, Director of the Esperanto Study Center of Mongolia (whose address, for the interested, is Central Post Office 13, P.O. Box 1088, ULAANBAATAR). (Sent by Prenda Cook)

Stephen Fry’s novel *The Liar* (Soho, 1991) mentions Esperanto in one place and Volapuk (which it describes, perhaps unfairly, as “a very silly international language”) in three. (from Maya Kennedy)

de Humphrey Tonkin

[Prof. Humphrey Tonkin, dum multaj jaroj Prezidanto de UEA kaj nuntempe Prezidanto de la Universitato de Hartford, prezentis la jenan Ĉefparoladon ĉe la 41a Jarkongreso de ELNA, la 17an de julio 1993.]

Karaj gekolegoj, karaj geamikoj.

Ju pli aferoj ŝanĝiĝas, des pli ili restas samaj. La mondo, al kiu la kreinto de Esperanto rigardis en la fino de la dekaŭna jarcento similas en multaj detaloj la mondon, kiun ni rigardas hodiaŭ. La granda ideologia batalo, kiu nin preokupis tra pli ol duonjarcento, kaj kiu fendis la mondon, laŭ ies interpreto, inter iu Okcidento kaj iu Oriento, ne estis la evolua posteulo de la iamaj etnaj dividoj inter la homoj, sed ties maskanto. Ne temis pri tio, ke, konstatinte ke eblas vivi en relativa etna harmonio, la landoj de meza kaj orienta Eŭropo elektis eksperimenti pri iu novamonda ordo, en kiu ili flankenlasis sian individuan liberecon en la nomo de iu kimerana nocio de kolektiva bonfarto. Ne temis pri tio ke dum tiu periodo dedikturo la homoj lernis respekti unu la alian. Male, la dikturo bridis portempe la aliajn kaŭzojn de malakordo inter la homoj, kaj tiuj malakordoj—precipe etnaj kaj religiaj—kune kun la reveno de relative individua libereco, ekflamis denove.

Multaj homoj, en multaj landoj kaj en multaj cirkonstancoj, utiligis sian nove trovitan individuan liberecon por malami aliajn kaj por klopodi amasigi al si ne nur la propran liberecon, sed ankaŭ tiun de aliaj. Ili uzas sian liberecon ne por ami, sed por detrui.

Tiu fakto en si mem ne estas kialo por reiri al la malnovaj metodoj, ne estas kialo por refali en la kaptilon de diktura batalo inter ideologioj, malgraŭ tio, ke jen kaj jen troviĝas tiuj, eĉ en Okcidento, kiuj nostalgias al tiu simpla epoko kiam la reguloj pri persekutado estis bone konataj kaj facile aplikeblaj.

Sed tro facile ni en Okcidento supozas, ke la Bono, nia Bono, venkis kontraŭ la Malbono, kaj ke nur necesas apliki la lecionojn de okcidenta kapitalismo por plibonigi la sorton de ĉiuj. Vero estas, ke, malgraŭ la grandaj sukcesoj de la

okcidenta mondo, malgraŭ tio, ke la okcidenta sistemo brile dresas kaj direktas la ŝajne naturajn homajn aspirojn, malgraŭ tio, ke kreskigo de la ekonomio plej bone funkcias en medio, en kiu la homoj estas relative liberaj ludantoj—malgraŭ ĉio ĉi, ni konstatu, ke kun tiuj demokratiaj kaj kapitalistaj rajtoj venas respondecoj, kiujn ni jam de epokoj pli kaj pli forgesas, pli kaj pli neglektas. Ni mem, kiuj tiel neperfekte mastrumas la propran domon, ne imagu, ke simpla aplikado de la principoj, kiujn ni lernis ĉi tie, subite kreos paradizon en aliaj partoj de la mondo.

La leciono, kiun devas lerni kaj Okcidento kaj Oriento estas, ke, se libera ekonomio funkcias pli bone ol centrigita ekonomio, kaj se politika libereco estas pli bonarimedo ol dikturo, des pli gravas, ke ni tenu ĉiam senton de respondeco unu al la alia, ke ni rekonu la fakton, ke ni ne rajtas, nek devas, ekskluzivi niajn najbarojn kaj niajn kolegojn el partopreno en la socio, kaj ke ni ĉiuj havas devon ne nur ĝui niajn sociajn rajtojn sed ankaŭ kontribui al la socio.

Ni sidas ekzemple ĉi tie en halo, kiu troviĝas nur kelkajn centojn da metroj for de unu el la tri grandaj gimnazioj de la urbo Hartford. La lernantoj en tiu gimnazio estas preskaŭ centprocente nigraj. La du aliaj gimnazioj de la urbo prezentas iom similan bildon: iliaj lernantoj estas plejparte aŭ nigraj aŭ latinamerikaj. Du kilometrojn laŭ la alia direkto troviĝas antaŭurba gimnazio, kiu estas preskaŭ komplete blanka kaj orienta.

Ni miras pri la kapablo de homoj en tio kio estis iam Jugoslavio enterigi sian ŝajnan reciprokajn respekton por sekvi la vojon de senutila kaj neracia interetna milito. Sed ĉu ni mem ĉi tie estas senkulpaj nur pro tio, ke ni eltrovis manieron pace instituciigi la disdividon de la raso? Ĉu ni estas senkulpaj nur pro tio, ke ni trovis manieron teni por certaj homoj la fruktojn de nia libera sistemo, dum ni ŝlosas aliajn for de la fruktarbo?

Nia socio estas profunde malsana, oriente kaj okcidente, kaj (Dioscias) norde kaj sude. En tiu malsana mondo, en kiu raciaj solvoj al problemoj estas ofte

mokataj kaj priridataj, kaj en kiu la homoj kiuj havas avantaĝojn estas pretaj uzi ĉiujn pretekstojn por ilin konservi, ni ne miru, ke fojfoje la nocio, ke ĉiuj homoj povus rilati unu al la alia per lingvo neŭtrala, en spirito de egaleco, ricevas la mokojn de aliaj.

Kaj ni ankaŭ ne miru, ke kiam en orienta Eŭropo la ĉenoj estas fine forprenitaj, tiu subgrunda movado tiel profunda kaj granda, kiu estis la Esperanto-movado, malgrandiĝis kaj troviĝas en stato de krizo.

Tiu krizo de la Esperanto-movado estas en multaj anguloj de nia movado nuntempe diskutata. En la fruaj jaroj de Esperanto, la ĉefa argumento por la utiligo de la lingvo estis la simpla fakto, ke la homoj ne komprenas unu la alian kaj ke ili bezonas simplan flekseblan lingvon por la internacia kaj interlingva komunikado. Rigardante ĉirkaŭ si la kapablon de la homoj detrui unu la alian en la nomo de etna supereco, Zamenhof kreis lingvon, kiu superpuntu la miskomprenojn kaj serĉu la komunajn elementojn inter la homoj, por tiel igi ilin kompreni, ke tio kio unuigas ilin estas pli grava ol tio kio dividas ilin.

Tiu problemo estis frontita ne pro la genio de Zamenhof (kvankam mi estas konvinkita, ke temis pri genia kreaĵo) sed pro la simpla fakto, ke teknologio, kaj ĉefe la teknologio de vojaĝado, ligita kun ekonomia progreso, kiu kreadis mezan klason, pli rapide iris ol la baza edukado, tiel ke ekzistis granda klaso de homoj kun pli da mono ol lingvoj, pretaj vojaĝi kaj obstrukcataj de lingvaj diferencoj.

La klopodoj de Zamenhof, malgraŭ mirindaj sukcesoj, malgraŭ tio ke homoj el ĉiuj anguloj de la mondo lernis la lingvon kaj interkomunikiĝis per ĝi, ne estis, en pli granda perspektivo, sukcesa. La mondo falis en la plej grandan kaj gravan konflikton, la Unua Mondmilito, ĝis tiam viditan.

Sed Zamenhof ne komprenis, aŭ ne volis kompreni, ke malantaŭ la etnaj konfliktoj de tiu epoko en Meza Eŭropo kuŝis multe pli granda konflikto, etna konflikto tiel granda, ke ĝi igis aliajn etnojn unuiĝi por ĝin praktiki: la antisemitismo.

Denove temis pri tio, ke la teknologio pli rapide avancis ol la homa edukiteco: la Hitleristoj sukcesis mobilizi vastajn homtavolojn pro la ekesto de modernaj komunikiloj—la radio, la telefono, la laŭtparolilo. Oni foje diras, ke sen laŭtparoliloj, naziiismo ne estus aplikebla. Kontraŭ tiu granda forto de la antisemitismo, nia Internacia Lingvo, nia “lingvo de judoj kaj kosmopolitoj”, kiel nomis ĝin Stalin kaj Hitler, estis ja malforta. La familio Zamenhof mem plejparte pereis en la fajroj kaj fornoj de tiu epoko.

Paralele kun tiu konflikto ekestis la granda ideologia konflikto per la kresko de la soveta imperio. Batalante tiun konflikton, kaj venkinte la plej grandan etnan minacon per detruo de Hitlerismo en la Dua Mondmilito, ni supozis, ke ideologio anstataŭas etnan konflikton kiel nia plej granda malamiko, kaj detruinte etnan konflikton en la Dua Mondmilito kaj nun ideologian konflikton, ni pretas por kreo de pli libera, pli deca mondo.

Sed la lecionoj, kiujn ni instruis al la nova mondo estas ne nur la bonoj de la libera merkato, sed la malbonoj de perforto, de priŝtelo, de egoismo, de ekskluzivismo, kaj de ia miismo kaj niismo, kiu denove dividas la mondon laŭ iu freneza konflikto de la pronomoj.

Kion Esperanto povas fari por ŝanĝi tiun situacion? Kiuj estas niaj devoj kiel parolantoj kaj uzantoj de la Internacia Lingvo?

Ekzistas iuj voĉoj, kiuj diras, ke Esperanto jam sukcesis, kaj ke la Esperanto-movado ne bezonas disvastiĝi, ĉar jam ekzistas reto de samideanoj, kiu kovras la mondon, jam ekzistas kongresoj kaj konferencoj, jam ekzistas floranta Esperanto-literaturo, jam ekzistas parolkomunumo (kiel nomus ĝin la lingvistoj), kiu post cent jaroj da agado subtenas vivantan kaj maturan lingvon. “Ni ne bezonas feliĉigi la mondon, se tiu ne volas,” lastatempe skribis en la revuo *Esperanto* unu apoganto de tiu vidpunkto. “Ni feliĉigu nin mem, kiuj ja volas.”

Tiu spirito, almenaŭ certgrade, kuŝis malantaŭ la deklaro, kiun junaj parolantoj de Esperanto prezentis al la mondo antaŭ pluraj jaroj el internacia konferenco en Raŭmo, Finnlando. Tiu Raŭmismo, kiu baze asertis, ke estas pli grave profundigi nin en la scio kaj utiligo kaj ĝuo de Esperanto ol konvinki aliajn

aliĝi, havas certan agrablan allogon. Se niaj kolegoj mokas nin ĉar ni praktikas strangan lingvon, se niaj amikoj nin kritikas ĉar ni traktas kun strangaj homoj el foraj mondopartoj, estas ja facile simple deklari, ke ni kaŝos nian esperantistecon, ke ni evitos la mokojn evitante iliajn kaŭzojn.

Kaj ni ne minimumigu tiun problemon. Ĝenerale la homoj ne estimas Esperanton, interalie ĉar ili ne pretas kredi je la miraklo de Esperanto—ke ĝi ja igas profundan internacian komunikadon, pri la plej malfacilaj kaj komplikaj temoj, demokrate farebla de ordinaraj homoj. Kaj se ili ne kredas, logike sekvas, ke ni strangas ĉar ni kredas, ke ni iel suferas pro iluzioj, iel imagas, ke ni komunikigas—ĉar vera komunikado estas farebla nur per lingvo, kaj Esperanto ne estas vera lingvo.

Estas ja pli facile eviti la tutan demandon, kredante, ke la Esperanto-movado jam sufiĉas al si, ke ni ne bezonas la eksteran mondon.

Pliajn argumentojn por tiu vidpunkto alportas la simpla fakto, ke la parolantoj de Esperanto ofte tre neperfekte kaj neadekvate parolas ĝin, kaj ke ja necesas, ke ili pli enprofundiĝu en la lingvon. Necesas, ke ni havu niajn literaturajn revuojn, ke ni profunde diskutu lingvajn problemojn en la movado, ke ni evoluigi la skriban kaj parolan lingvon de Esperanto. Necesas, ke ni dediĉu parton de nia tempo al lingva dommastrumo.

Mi ne neas tion. Mi ne neas, ke mi ne antaŭenigas mian karieron, aŭ altigas la reputacion de nia universitato, per mia interesiĝo pri Esperanto. Mi ne neas, ke mi havas kolegojn, kiuj opinias min komplete freneza pro mia okupiĝo pri Esperanto (kvankam ili ja admiras mian scion pri diversaj temoj, scion akiritan ĝuste per tiu rimedo, kiun ili malestimas).

En tiu ĉi kongreso ni saĝe traktas tiujn demandojn, klopodante pliprofundigi nian scion pri la ĉiutaga uzado de Esperanto. Sed la kongreson ankaŭ akompanas kurso pri Esperanto, en kiu ni instruas la lingvon al komencantoj, kaj kunsidoj, en kiuj ni pritraktas pli vastajn problemojn, kiuj rilatas al la ekstera mondo kaj ĝia kondiĉo.

Ni pravos en tio. La Esperanto-movado ja portas al ni agrablan socion, ja donas al ni okazon ĝui internacian vivon kun homoj el ĉiuj partoj de la mondo, kun amaso da

interesoj kaj amaso da scioj. Sed ne sufiĉas, ke ni ĝuu ĝin: ni havas solenan devon utiligi tiun doton, tiun donacon, kiun ni heredis, por krei pli bonan mondon. Ne temas pri tio, ke “ni ne bezonas feliĉigi la mondon, se tiu ne volas.” La interkompreno, la toleremo, la interkomunikado, tiuj estas necesaj elementoj por la mondo tute sendepende ĉu tiu mondo deziras aŭ ne deziras tion aŭskulti. Ni ja ne perdu nian tempon vane disvastigante la mesaĝon de Esperanto, sed, se ni malsukcesas, ni ŝanĝu la rimedojn, ne la celojn.

Kaj se iuj estas feliĉigataj de la mortigo de aliaj, malmultaj homoj feliĉas esti mortigataj.

Tamen ni frontas grandajn obstaklojn. Ĉar Esperanto proponas la eblecon de senpera internacia komunikado, ekster oficialaj kanaloj, ŝirmata de interveno de burokratoj (precize ĉar la burokratoj ne komprenas ĝian gravecon), ĝi emas flori kaj prosperi en totalismaj landoj, kie la libera komunikado de la homoj estas malhelpata. Sekve, ĝi floris en Sovetunio, en Hungario, en Pollando, en eksa Jugoslavio. Venis la tieinomata libero, kaj la Esperanto-movado multilate velkis, ĉar la homoj nun havas aliajn kanalojn por la internacia komunikado, ne troviĝas sub rigardo de la instancoj, kaj ankaŭ ne havas la liberan tempon, kiun ili iam posedis, ĉar nun necesas perlabori la panon. Perdiĝis ankaŭ tiu oficiala pozicio, kiun Esperanto akiris jen kaj jen, kiel ŝajne facile regebla elemento en ŝtata komunika politiko.

Tiel—kaj jen granda ironio—la lingva movado, kiu tiel profunde (multe pli profunde ol multaj homoj imagas) subfosis la totalismon de tiuj landoj, estas nun vundata de la diskolapso de la totalisma domo, kiun ĝi subfosis. Dume, en la tielnomata libera mondo, la homoj perdiĝas en la hedonismo de konsumado, kaj ili neglektas la valorojn, sur kiuj la (por tiel diri) rajto al hedonismo estas fundamentita.

Pola Radio mallaŭtiĝas iom post iom. La revuo *Hungara Vivo* malaperis. Bulgara Esperanta Asocio estas nura ombro de tiu kiu ekzistis pli frue. Kaj tra tuta iama Sovetio, lokaj kluboj fermiĝas, la agado por Esperanto fariĝas periferia. Kaj en tiu iama lando, Jugoslavio, kie Esperanto eble, el ĉiuj landoj, plej komplete eniris la ĝeneralan fluon de la

socio, ĝiaj principoj neglektiĝas kaj falas kontraŭ la tajdo de la sango, kiu nun sufokas la tieajn popolojn.

Eble temas pri tio, ke ĉiu natura forto kreas sian kontraŭforton—ke en Jugoslavio Esperanto dum multaj jaroj prosperis kiel kontraŭpremo kontraŭ la netoleremo kaj etna agresemo. Mi ne scias la respondon al tiu demando, sed, kiel ajn, ĝi donus malmultan komforton.

La mondo ja similas tiun mondon, en kiu Zamenhof pastroservis, kaj liaj rimedoj—eltrovo de komunikilo inter la homoj, kaj de transpontaj kredoj, kiuj permesus la lokajn diferencojn, sed en kadro de unueca humanismo—tiuj rimedoj ne estas eksmodaj en nia hodiaŭa universo.

Ni jam rimarkis, ke en la epoko de Zamenhof la vojaĝado fariĝis multe pli facila. Tiu kontakto, inter homoj, kiuj trans grandaj distancoj komuniĝas kaj trovas komunan vidpunkton, iris plian stadion en la dudekaj kaj tridekaj jaroj, kiam unudirektaelektronikakomunikado ebligis per radio la mobilizon de homoj trans grandaj distancoj en la Hitlera kaj Stalina totalismoj. Hodiaŭ venis dudirekta komunikado tuja kaj tutmonda. Kiel antaŭe, la scienco pli rapide kuras ol la edukado, kaj ni ankoraŭ ne edukiĝis adekvate por utiligi la novajn rimedojn je nia dispono.

Mi estas konvinkita, ke la estonteco de Esperanto dependas de nia kapablo utiligi la elektronikajn rimedojn por unuigi nian movadon ĉirkaŭ la grandaj demandoj de milito kaj paco. Ni devas utiligi tiujn rimedojn por krei demokratian dialogon

pri la estonteco de nia planedo, kaj pri la valoroj, kiuj fundamentas nian socion. Se ni ne kaptas tiujn rimedojn, aliaj, la Hitleroj, kiuj tamen ĉiam hantas nin kiel duobluloj, ilin kaptos por krei ankoraŭ pli terurajn totalismojn.

En unu aspekto, la mondo de Zamenhof kaj tiu de hodiaŭ estas malsimilaj: tiam regis granda lingva diverseco; hodiaŭ pli kaj pli la elito de la mondo, la internacia klaso, por tiel diri, utiligas la anglan lingvon pli-malpli kompetente. Ĉu la epoko de Esperanto finiĝis ĉar la angla venkis? Mi opinias, ke ne. Unue ni notu, ke en certaj mondopartoj, kaj precipe la Eŭropa Komunumo, la lingva batalo daŭras, eĉ atingis absurdan kaj kompletan ŝtopiĝon. Esperanto prezentas pli racian, pli malmultekostan solvon ol iu ajn alia tiel nomata solvo al tiu problemo de la Eŭropa Komunumo. Simila, malpli ekstrema problemo restas nesolvita en Unuiĝintaj Nacioj. Tie utiligo de Esperanto povus plifaciligi la veran dialogon kaj redukti la kostojn—se ĉiuj homoj pretus kune porti la relative malgrandan ŝarĝon ĝin enkonduki.

Tamen, tiuj, kiuj supozas, ke Esperanto povos en baldaŭa estonteco ludi la rolon de la angla lingvo en la internaciaj aferoj, tiuj revas. Sed unu el la mesaĝoj de la esperantistoj, jam tra multaj jaroj, estas, ke unu lingvo ne sufiĉas por ĉiuj homaj intertraktoj. Se la angla lingvo ludas, kaj plu ludos, la rolon de teknika ligilo, kaj de portanto de la valoroj de la libera ekonomio, la Esperanta lingvo povas paralele ludi la rolon de filozofia, neŭtrala

lingvo, en kiu la profundaj demandoj de la homaro povas esti traktataj en spirito interpopola, neekspluata. Kaj se la angla lingvo, almenaŭ dum potencos la anglalingvaj landoj, restos komuna dialekto de la internacia kapitalista vivo, tamen restas loko por la facila kaj senpartia lingvo Esperanto ĉar ĝi estas portanto de valoroj daŭraj, esencaj, kaj (mi tamen kredas) venkokapablaj en nia suferanta mondo.

Sed se ni ne traktos serioze tiun seriozan lingvon, se ni ne kredos je la potenco de Esperanto kaj riskos enkasigi la miskomprenojn kaj eĉ mokojn de aliaj, Esperanto neniam sukcesos—kaj ni esperantistoj ne portos al la komuna tablo de la homaro nian kontribuon al pli paca mondo. Jes, ni devas profundigi nian scion de Esperanto, kaj jes ni devas fortigi nian propran Esperanto-socion, sed, lerninte Esperanton, ni akceptis pli grandan respondecon. Niaj Esperanto-organizaĵoj devas trovi manierojn pli forte kaj pli rekte engaĝi la ceteran mondon je la nomo de tiuj idealoj, kiujn ni kredas gravaj. Belas kultivi nian ĝardenon, sed ne je kosto de ignoro de la ĝangalo preter ĝiaj bariloj.

Do, oficiale bonvenigante vin al nia universitato, kaj dankante vin pro via partopreno, mi samtempe donas al vi taskon: traktu serioze vian esperantistecon, ne perdu kuraĝon pro la nekompreno de aliaj, kaj ne perdu energion en la batalo por tiuj valoroj de paco kaj toleremo, kiuj jam pli ol unu jarcenton iluminis la Zamenhofan vojon.

FROM THE (NEW) PRESIDENT

This issue of the newsletter is running very, very late; hopefully, we'll get all the remaining issues to you (including our Literatura Suplemento, which is almost ready) by the end of the year—we have just about enough material already. Unfortunately, this year has been a very busy one for me, and is only getting busier, as you shall see.

The annual ELNA Congress has come and gone. You can read reports on it by Zdravka Metz and Jozef Truong elsewhere in this issue. By all accounts, it was quite successful. The decision was taken at the Congress itself to hold next year's

Congress in Sacramento, California. So if you are planning to go to the UK in Seoul, Korea, start making plans now to spend the previous weekend in Sacramento, en route from just about anywhere in the United States to Korea. If you are planning to participate in the three-week Esperanto Summer Workshop at San Francisco State University, start making plans now to spend the weekend after the Workshop in Sacramento, less than a hundred miles from the SFSU campus. If you aren't planning on doing anything else next summer... well, plan to come to Sacramento anyway.

The results of the ELNA elections, for those of you who voted (a word on that in a moment), are: new Board members are Dorothy Holland, David Richardson, Derek Roff; new Vice-President, Sherry Wells; new President, Don Harlow. Congratulations to the new electees, and our sincere thanks to outgoing Board members Jim Lieberman and David Wolff, former Vice-President Grant Goodall, and former President Angela Harlow, whose final report will be found elsewhere in this issue.

(Those who are leaving office are not, however, leaving ELNA, or even slow-

ing down. Angela Harlow is going to serve as Commissioner for Congresses during the coming year, and use her experience helping to set up the Congresses in Raleigh, Berkeley and Hartford to help the Esperanto Society of Sacramento—a city where she has many contacts, friends and relatives—prepare next year's Congress. Grant Goodall has accepted the chairmanship of a committee to study and, if necessary, revise ELNA's ensemble of informational materials. David Wolff, as well as working on the publication of Peter Benson's *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*, will be participating in the work of Donald Coleman's new Commission on Local Groups—you'll be seeing more about that from his own desk. Jim Lieberman, of course, has his hands full running the Esperantic Studies Foundation in Washington, DC.)

There are two statistics about the election that I think deserve your attention. First: the turnout was exceptionally high, for ELNA—40% of our membership voted, as compared to a more usual 25%. I believe that this was due to the interest aroused by the campaign letters that David Wolff and I sent out. I hope that this interest in ELNA affairs will continue on into the future, and will not be a one-year phenomenon.

The other statistic is that only some 16% of the ballots were spoiled this year. This is better than usual (20%-25%), but still not good. The usual cause of spoilage is *the absence of a blank inner envelope containing the ballot*. The reason for the inner envelope is simple. The outer envelope carries the voter's name, to be checked against a list of current ELNA members; at the time this occurs, the envelope is opened and the inner envelope containing the ballot is thrown into a basket. Later, the inner envelopes are opened and the ballots themselves are tallied. The presence of the inner envelope makes it impossible to link a particular ballot with a particular individual. Please keep this in mind when you vote in 1994.

Most of you will have seen my campaign letter in which I list a number of points that I want to see ELNA address over the next three years. In future issues of the newsletter, I intend to discuss those issues, in terms both specific and general. I hope that you'll make use of the newsletter to discuss them, as well. Right now, I want to talk about a few

more general views that I hold with respect to Esperanto. I expect to go into more specific details as time goes on.

Communications

Esperanto exists to facilitate communications between people. In this sense, it is not, and was never intended to be, an end in itself. The designers of most constructed languages see little beyond the concept of the language itself ("I have created Planetglot to serve as an international language"); Zamenhof conceived of Esperanto as, to emphasize a concept stressed in somewhat different form by Prof. Humphrey Tonkin elsewhere in this issue, a carrier of ideas from person to person, under conditions in which no other such carrier is as available or as effective.

It's an interesting paradox that, as far as I can tell, the Esperanto movement, whose entire *raison d'être* is communication, has not yet made really effective use of many of the currently existing resources of global communication.

One of my primary goals is to continue changing this, at least as far as ELNA is concerned. My predecessor, Angela Harlow, worked to get our 800-number information line installed in the Central Office and, later, helped the C.O. staff purchase a fax machine and get it up and running. Within three weeks after I was elected President, the C.O. finally came on line, with an electronic mail account through a commercial firm here in the Bay Area. There are now four ways to communicate with the Central Office (please make a note of these):

If you only want to get a standard package of information about Esperanto, or a copy of the first lesson in the ten-lesson free course, phone 1-800-828-5944, and leave your name and address.

If you want to talk to someone in the Central Office about a specific matter, phone 1-510-653-0998. Please limit your call to no more than ten minutes.

If you want to send a fax to the Central Office, send it to 1-510-653-1468. If you need something to be faxed to you from the Central Office, provide the C.O. with your own fax number.

If you have electronic mail capability over the internet (e.g. from Compuserve, America On-Line, etc.), send your message to elna@netcom.com.

In other words, the C.O.'s communications capabilities have quadrupled within the past four years. More, its reaction time has shortened considerably; during

the work week, you can send a written message to ELNA over the net and receive a reply the same day (if you want a well-thought-out reply, you may have to wait a day—human reactions have not improved).

More and more Esperantists are able to communicate instantly and globally. Dietrich Weidmann in Switzerland has compiled a list of those Esperantists who have fax capability. Derk Ederveen in the Netherlands already provides a monthly list of individuals who participate actively in Esperanto computer net activities. According to figures provided by Edmund Grimley Evans in the United Kingdom, some 25,000 individuals at least scan the messages in Usenet's Esperanto newsgroup soc.culture.esperanto in any given month. And some 15% of ELNA's members already provide ELNA with their network addresses—see your 1993 Address List for details. For next year, we'll be asking for your fax number, as well.

Can Esperanto and Esperantists use this ability to communicate globally to advantage? I suspect so, more than most people think. Several Esperantists have already been "flamed" on the net for not realizing that "English is the international language of the net" and using this strange tongue. But that internationality of English is at best limited to what Prof. Tonkin refers to as an "élite"; I follow several different newsgroups, and in none of them are the participants anywhere near as diverse in nationality as in the Esperanto group—almost all are Americans, some are Canadian, Australian, British or Enzedder, a very few are either German or Scandinavian or Dutch ... and other nationalities are more or less conspicuous by their absence, even in so eclectic a group as the science-fiction fans.

Over the next three years, we will be working on ways to take advantage of all these modern communications technologies—and the new ones that will be coming along during that period. If you have any ideas, be sure and let us know.

Youth

For many years, American Esperantists have complained that the Esperanto movement in this country is becoming superannuated, that it is, dominated by the geriatric set (of which I am now at least an honorary member). This is not actually a global problem; I remember one American Esperantist, visiting Korea, who had to listen to complaints by the

Esperantists there (mostly students) that there were not enough older people in the Esperanto movement; and I myself once suffered from stage fright when facing a room containing some 300 Chinese Esperantists, most of them apparently below the age of consent. But it does remain an American problem; and in my opinion we have to place special emphasis on bringing more younger people into the Esperanto movement.

The obvious reason for this is, of course, to show the media that we really aren't all old fogies. But there are at least three other reasons I can think of:

(1) The future leaders of the Esperanto movement generally come from the ranks of the Esperanto youth movement. We have to be varbing those future leaders now. They have to be playing roles in the Esperanto movement now. After all, they will have the job of moving it forward dumped in their laps right around the beginning of the new millenium—and that's only about seven years off.

(2) Worse, the future leaders of the world are young people today; and if we want them to know Esperanto, or at least know of Esperanto, it's young people we're going to have to recruit, not today's leaders (who have neither the time nor the inclination). Franz Jonas, the Esperantist President of Austria, wasn't an elderly President when he learned the language; he was a young printer's apprentice. The old-time Esperantists who kept the movement going in China through the war, the revolution, the great leap forward, the cultural revolution, and into the eighties weren't always high up in the Chinese

gerontocracy; they learned Esperanto as young high-school and university students, as fiery young intellectuals, back in the twenties and thirties. Our job is not to convince Bill Clinton to learn Esperanto; our job is to convince today's teenage girl who is going to be elected President in 2028 to learn Esperanto.

(3) Finally, we need young people, because they can function relatively easily in a world that's rapidly growing beyond our generation. I talked about communications above, and our need to use new systems of communications; but it's the younger Esperantists who will have to show us how to make the best use of these, because they take for granted realities that haven't yet had time to sink into the subconsciouses of us older people. As an example: when the former president of ELNA, over in Hartford, requested that we get her a copy of the ballot immediately, Mike Donohoo and I came very, very close to stuffing it in an Express Mail package and sending it to her at a cost of about \$10; we were on our way out of the Central Office when we almost bumped into the fax machine, and the thought gradually surfaced ... somebody a decade or so younger would almost certainly have thought of the fax machine as the first possibility.

Local Groups

Local Esperanto groups are the backbone of the national Esperanto movement. There is very little that ELNA can do at the local level; and it is also very difficult for isolated individuals to function without mutual support from other Esperantists in the local area. For Espe-

ranto to take root and spread within a particular area, that area must have its local group.

Local groups really have several purposes:

(1) They give Esperantists a chance actually to see the language at work, and to practice it for themselves. A survey Mark Stephens carried out several years ago showed that those Esperantists who belonged to local groups generally felt more confident, and considered themselves better speakers of the language, than those Esperantists who lived in isolation.

(2) They allow us to give each other mutual support. We're all familiar with the problems we encounter with family, friends, and especially strangers who, upon hearing the very mention of Esperanto, and knowing absolutely nothing about the language, make jocular or even hostile comments about it. No matter how well we know that they don't have the vaguest idea what they're talking about, it's difficult to continue supporting an idea that those around us find at best amusing—unless there are others around us who support the same idea, to help instill mutual confidence.

(3) They allow a wider range of action at the local level. There's only so much a single individual can do. A group of people can establish exhibits, teach classes, publish a local newsletter ... the options are almost endless. A single person only has so many hours in a day.

More later ...

Don Harlow
President, ELNA

ESPERANTO EN ĈIUTAGA VIVO

de Zdravka Metz

Kiam mi komencis lerni Esperanton kiel mezgrada lernantino, mi ne pensis ke iam en la vivo mi uzos ĝin ĉiutage.

Pri Esperanto mi unue aŭdis de mia patro kaj poste de mia profesoro de matematiko kiu instruis Esperanton. Ŝi ofte rakontis al mi pri kongresoj, korespondado kaj internacia amikeco.

En 1968 por la unua fojo mi vojaĝis eksterlanden sen akompano de gepatroj. Mia korespondamikino el Hungario kiu jam gatis ĉe mi samsomere invitis min viziti ŝin. Dum tuta semajno ŝi promenis kun mi tradukante de la hungara al Esperanto kaj

inverse.

La Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Graz, Aŭstrio en 1970 estis mia vera verdiĝo. Kiel 18-jara junulino impresis min tiu internacia renkontiĝo kiun ĉeestis ĉirkaŭ 300 personoj el trideko da landoj kiuj parolas unu lingvon kaj ĉiuj samtempe: ridas, kantas, diskutas, sportumas; unuvorte, interkompreniĝas.

Reveninte al Varaĵdin, urbo de mia infanaĝo, mi petis permeson de instruistino de Esperanto ke mi instru al gejunuloj. Eble ne ĉion mi sciis sed tiun entuziasmon kiu plenigis min dum IJK mi nepre volis

transdoni al tiuj kiuj ĵus komencis studi la lingvon.

Dum Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) mi komencis gvidi pupteatrajn grupojn el diversaj landoj kaj traduki spektaklojn de Esperanto al la kroata.

Jaron poste mi fariĝis studentino en Zagrebo. Ĉiuaŭtune mi transprenis gvidadon de kurso en elementa lernejo kaj fine de lerna jaro mi ekvojaĝis kun lernantoj al iu lando por infana renkontiĝo.

En 1976 mi eklaboris en Internacia Kultura Servo (IKS). Intertempe mi jam estis kasistino de Kroata Esperanto-Ligo

(KEL), poste ankaŭ estrarano de TEJO, fondinto de du vilaĝaj kluboj, sekretariino de Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL).

En 1980 dum IJK en Rauma, Finnlando, mi renkontis Normandon. Malgraŭ ke li parolis du-tri aliajn lingvojn kaj mi ankaŭ, Esperanto estis la sola komuna lingvo. Ni korespondis, poste interŝanĝis ankaŭ vizitojn kaj jaron poste ni geedziĝis.

Nek por li nek por mi okazis edzino-fino. Ni kvazaŭ duobligis Esperanto-energion kaj daŭrigis la semadon.

Komence ni vivis en Varaŝdin kie Normando estis kursgvidanto kaj post la alveno en Granby, Kebekio, ni komencis serĉi kontaktojn.

En 1982 en aŭtuno ni organizis provincan societon Esperanto-Societo Kebekia (ESK) kaj daŭre aktivis en provinca kaj loka niveloj.

Vivinte jam de longa tempo kun esperantistoj mi havis eblecon renkonti infanojn kiuj parolis Esperanton denaske, ĉar kutime patroj instruis al ili la lingvon. Tiel mi jam aŭdis unuajn principojn pri dulingva edukado de infanoj.

Ni mem uzis nur Esperanton inter ni kaj ni volis ke ĝi estu nia familia lingvo.

Antaŭ ol ni havis niajn infanojn ni iom pli interesiĝis pri instruado de lingvoj kaj aŭdis pri diversaj principoj:

A—unu persono—unu lingvo plejofte inter samlanda paro

B—Esperanto endome kaj nacia lingvo ekstere

C—Esperanto unu tagon, alia lingvo alian tagon

D—Lingvo depende de la situacio—plej natura principo

Tiu lasta ŝajnis al ni logika kaj ni komencis eksperimenti de la unua tago de nia unua infano. Do, kutime la matenon ni du parolis Esperante tiel ke nia filo aŭdis la internacian lingvon. Post la foriro de Normando al laboro, mi diris al nia filo ke paĉjo foriris kaj nun mi parolos al li kroate. La saman frazon mi ripetis en la kroata kaj mi jam daŭrigis paroli kroate. Kiam iu familiano aŭ najbarino alvenis mi ekparolis france kaj mi diris al infano ke mi ŝanĝis la lingvon pro tiu persono. La unuan jaron mi estis plejofte sola dum la tago kaj mi volis ke nia infano aŭdu la francan. Ĉiutage mi funkciigis televidilon kiam okazis duonhora infana programo kaj mi laŭte ripetadis frazojn. Samtempe tio estis bona praktiko por mi ĉar mi ankaŭ estis komencantino en la franca. Ĉiam mi nomis la lingvon antaŭ ol mi komencis paroli alian lingvon. Same, kiam Normando revenis hejmen, mi atentigis pri situacio kiam ni ekparolos Esperanton.

Nur dufoje mi eksperimentis paroli kroate al mia filo en franca medio sed nek mi sentis min agrable, nek estis facile ĉiam streĉi al

kiu paroli kiun lingvon. Tiel post du-tri prov-frazoj mi daŭrigis paroli lingvon depende de ĉeestantoj.

Regule ni sonbendigadis unuajn vortojn, ni notis interesajn esprimojn. Kompreneble ĉiutage ni legis al infanoj rakontojn, eĉ se foje ŝajnis al mi kiam mi legis al sesmonata bebo ke eble li kaj poste ŝi, nenion komprenas sed almenaŭ bone endormiĝas pere de legado.

Tamen estas interesa sperto kiam nia filo estis 20-monata li sufiĉe kompreneble interparolis kun ni. Li bone distingis kiun lingvon li parolas kun kiu persono kaj eĉ foje li atentigis nin se ni ne respektis regulon kaj eble ne ŝanĝis lingvon.

Alia interesa sperto okazis al ambaŭ infanoj kiam ili havis tri jarojn. Tiam estis ia periodo de kelkaj monatoj kiam infanoj miksis tri lingvojn en unu frazo. Tio estis terura por aŭskulti. Sed ĉiam mi petis ke ili ripetu la demandon aŭ frazon, kiun mi bone komprenis eĉ se estis trilingva, en la lingvo kiun ni parolis en tiu situacio. Post iom da tempo ne plu estis problemo. Mi havis impreson ke infano faras teston kun ni ĉu pasos tia komunikado.

Aparta sperto estis post feriado dumonata en Kroatio kie ili ĉiam nur uzis la kroatan. Mi preskaŭ ne volis kredi kiam okazis la semajno de 100-jara jubileo en Zagrebo kaj kiam mi volis montri al pluraj Esperanto-amikoj kiel mia kvarjara filo lertas parolante Esperanton, kaj li kompreninte la demandon respondadis nur kroate. Mi sentis min ŝokita kiam mi vere konstatis ke li kvazaŭ perdis sian parolkapablon ne nur en Esperanto sed ankaŭ en la franca malgraŭ ke li bone komprenis ankaŭ francajn kaj Esperantajn demandojn. Post nia reveno en Montrealon, Damir, nia filo, parolis al ĉiuj nur kroate. Patrinaj de liaj geamikoj koleriĝis kontraŭ siaj infanoj kiuj provis imiti Damir nenion kompreninte. Du semajnojn ni provis stimuli lin, diversajn premietojn ni donadis al li por ĉiu bela vorto kaj frazo en Esperanto kaj la franca. Post du semajnoj ni revenis al normala ĉiutaga trilingveco. Li tamen ne miksis lingvojn parolante al francparolantoj.

Kompreneble nia atento estis pli granda ĉe unua infano rilate la lingvojn. Ĉe la dua, Mira, ni ne plu timis kiam ŝi uzis tri lingvojn en unu frazo, aŭ kiam post feriado filino parolis nur kroate.

Niaj infanoj ĉiam havis multe dakontaktoj kun najbaraj infanoj kaj ĉiam plene ĝuis socian vivon, malgraŭ ke ili ne iradis al vartejo. Mi restis hejme kaj mi kvazaŭ havis por ili unu-du-horajn ĉiutagajn aktivecojn en lingvoj ne uzataj en Montrealo.

Post la unua feriado en Kroatio mi konsciis pri la graveco havi kontaktojn kun aliaj infanoj en la kroata. Feliĉe en Montrealo ekzistas kroata komunuma centro kaj kadre

de sabata lernejo mi organizis infanan ĝardenon. Ĉiusabate ili ludis, kantis, kalkulis kun kroataj amiketoj. Hodiaŭ, ses jarojn poste ili ankoraŭ vizitas sabatan lernejon kie ili lernas skribi, kanti kaj danci.

Ioma ŝanĝo de niaj familiaj lingvaj reguloj okazis kiam infanoj devas fari lerneajn taskojn. Tiam, malgraŭ ke Normando kaj mi estas endome, dum tiu horo de taskoj ni parolos france ĉar ni ŝatus ke infanoj bone komprenu la taskojn kaj estu pli bone pretaj por la lernejo.

Estas ankaŭ tute normale kiam kune ludas Damir kaj Mira, ili uzas la francan inter si, ĉar por ili tio tamen estas plej facila lingvo, ĝi ja estas la lingvo de ilia infana ĉirkaŭaĵo.

Konante la tri lingvojn, niaj infanoj ne havas malfacilaĵojn kiam ni havas vizitantojn. Ili estas tre feliĉaj kiam vizitas nin iu esperantisto aŭ kiam estas Esperanto-renkontiĝo. Verŝajne por ili tio estas ankaŭ bezono senti plurpersonan Esperanto-medion, ĉar tio kvazaŭ pravas al ili ke ankaŭ ili ja bezonas Esperanton. Bonŝance ke esperantistoj havas paciencon kun infanoj speciale junuloj kiuj vere eniras ludon de niaj infanoj kio pliagrabiligas ĉefe plenkreskulajn renkontiĝojn sur ĉi tiu kontinento.

Ni jam partoprenis internacian familian renkontiĝon kaj tie eĉ por mi estis ĉarme vidi niajn infanojn kiuj senprobleme interparolas kun geknaboj el aliaj landoj.

Ekzistanta familia reto per sia bulteno venas kiel ia subteno por ni kiuj estas iom eble strangaj kun nia decido uzi Esperanton kiel familian lingvon.

Foje ni havas malfacilaĵojn rilate vortojn kiuj ne troviĝas en vortaro. Sed tiel infanoj povas vidi nian neperfektecon. Foje ni kune elpensas nomojn por objektoj, foje ni esperantigas francajn vortojn. Ĉiukaze ni ne faras grandan problemon de tio.

Ja ekzistas ankaŭ aliaj malfacilaĵoj kiuj venas pro malsamecoj: kulturaj, ideologiaj, kutimaj, pro edukado de infanoj. Sed kvazaŭ pere de Esperanto ĉio estas pli facile solvebla. Kvazaŭ ni ambaŭ estas pli pretaj por moviĝi de propra vidpunkto kaj akceptas negoci kaj esprimi sin.

Pere de Esperanto ni ne nur ĉiutage parolas, ni ankaŭ ridas, ploras, koleriĝas, ludas tage kaj nokte, dome kaj ekstere.

Iam je la komenco de nia translokiĝo al Kanado, Spomenka, mia amikino, sendis al mi karteton kun frazo—**ESPERANTO NE KONAS LANDLIMOJN**. Por mi landlimoj signifas limojn ne nur en geografia senco sed ankaŭ mensa. Ŝajnas al mi ke ni mem metas la limojn kaj foje tio ne permesas al ni evolui, agi kiel ni volus.

Pro tio mi dirus rilate Esperanton, ni uzu ĝin ĉiam, ĉie, kun ĉiu kiu komprenas nin pere de ĝi. Gravas ke ni sentas nin nature kaj bone.

LANGUAGE IN THE NEWS

[*Hmm...my dictionary doesn't seem to help with this one.*]

On American tongues, Somalian names are easily twisted. Consider the bruising given the name of a town where U.S. troops opened an airfield Sunday:

- USA TODAY—following the Pentagon's lead—and *The New York Times* spell the town's name Bale Dogle.

- The Associated Press, which cites Somalian sources, reports it's Beli Dogle.

- Reuters news service favors Bali Dogle. The *Los Angeles Times* and *The Washington Post* use Bela Dogle.

- *Newsweek* writes it all one word, Beladogle.

- The CIA opts for Balli Doogle; it won't say why.

One city—six spellings.

Garane Garane, a University of Evansville professor and Somalia native, says it's Bali Dogle (BAL-ee DOE-gul), which means a place with lots of grass. "Somalis like to talk about something that doesn't exist," he jokes.

As for the language, it's not difficult to master.

Says Garane, "If you know a little Arabic, a little Swahili, a little Indian—no problem."

[*From an article "Somalian spelling lost in translation" by Debbie Howlett, in USA TODAY, Dec. 15, 1992.*]

[*Personal best*]

A junior high school student forced to change schools due to differences with his English teacher and alleged abuse by schoolmates has asked the Tokyo Bar Association for support in seeking the restoration of his reputation and a formal apology from the school, bar association officials said.

The 15-year-old student, who spends summer vacations in the United States and has acquired English-language skills ahead of regular English courses that begin in junior high school, claims he has been harassed because of his language ability, according to a statement submitted to the bar association's Children's Human Rights Relief Center.

In the first trimester of his first year at No. 7 Junior High School in Nakano-ku, Tokyo, he received the highest score of five on his report card.

He also passed level three on the national English proficiency test, mastering high-school-level English, according to the statement. His mother is American, and he speaks English with her [*sic*] mother at home, the statement said.

Shortly after entering the school, however, the student says he was soon at odds with his English teacher due to his advanced English skills.

He claims the teacher did not accept answers different from a given pattern even if they were correct in grammar and content.

In the second trimester of his second year, he received a score of three (on a scale of one to five) on his report card.

When his parents protested the score, the school told them their son could not continue to attend the school if they complained further, the statement said.

He also faced abuse by classmates and teasing, such as schoolmates saying, "His mother is American, so he might have AIDS."

The boy's parents asked the school to arrange a meeting with the offensive students' parents but the school did not respond to the request, the statement said.

The student said he was forced to change schools after school officials asked him numerous times to do so. He did not attend school for one trimester during his third year because of the harassment, the statement said.

[*From an article in Mainichi, Dec. 23, 1992; sent by Joel Brozovsky.*]

[*"Do you know the way to San Jose?"*]

The question is no longer: "Do you know the way to San Jose?" but rather: "Do you know which San Jose you want to go to?"

Maybe Christa Landwehr should have figured it out when she got off the plane Sunday night and it was a chilly 36 degrees, instead of a balmy 60.

Maybe alarms should have sounded when the clerk at San Jose's Fairmont Hotel didn't greet her in Spanish and wouldn't accept her Costa Rican currency.

Tom Chandler, the Fairmont's night manager, said he didn't realize a travel agent's apparent mistake when the trip-weary woman checked in after a taxi ride from the airport because she only spoke German.

But when Heidi Price, a German-speaking clerk, arrived the next morning, the mix-up was discovered after Landwehr asked directions for a bus to Nosara.

"Is this city in California?" Price asked. "No, it's in Costa Rica," the woman replied.

[*From an article in the San Jose, CA, Mercury News, December 31, 1992.*]

[*Falling down on the job.*]

"Ni estas falantaj!" was the headline in *Heroldo de Esperanto*, June 10, 1992. Sev-

enty-three passengers died in New York in the crash of an Avianca airline company liner. The plane, with 158 passengers, fell in a wooded area on Long Island for lack of fuel after it circled for an hour and a half for permission to land. The pilot several times warned that they were running out of fuel. The U.S. Dept. of Transportation found that the problem stemmed from undecipherable messages. According to the official finding, the pilot did not use standard phrasing to indicate the urgency. Furthermore, the U.S. agency revealed that lack of communication is frequent in the northeast corridor which handles most passengers. In the recent past three similar accidents had been narrowly averted.

[*Reported in SFERILO, December 1992.*]

[*A corny excuse...*]

You state that "wheat, corn, and millet" were found in the second century B.C. tomb of Jing Di. Corn (*Zea mays*) is native to the Americas and did not reach China until some time in the 16th century A.D. It is true that the word is often used to refer to the primary grain crop of an area, and thus in this context would presumably refer to rice (*Oryza sativa*), but such a usage is very misleading. It could be taken as providing evidence for long-discredited theories about an Asian origina for *Zea mays*. (Wade Ray Wofford)

Our inclusion of "corn" was based on an error in translation. (the editor)

[*From the "Forum" column of National Geographic Magazine, Dec. 1992; pointed out by Ionel Onet. In the Queen's English, however, this use of "corn" would be perfectly legitimate.*]

[*CHIPS.*]

Conversation reported between California Highway Patrol officer and lodger who lives next door to the President of ELNA:
Officer: Don't you speak English?

Lodger: *Não.*

Officer: Do you speak Spanish?

Lodger: *Não.*

Officer: What are you, some kind of dummy?

(The lodger speaks Portuguese.)

[*Reported by Angela A. Harlow in January, 1993.*]

[*Tip of an iceberg?*]

What was unusual about the case of Maria de Jesús Ramos Hernandez wasn't what she said happened to her—the rapes,

Daŭrigo sur paĝo 14

JUNULAJ

La somero finiĝis (jes, la temp' flugas tiel rapide...), kaj nun mi atendas tre malvarmajn aŭtunon kaj vintron (almenaŭ kie mi loĝas). Do, dum mi serĉas vane por miaj puloveroj kaj vintraj ĉapoj, mi informos vin iomete pri la somero de USEJ.

Nu, laŭ mi, la somero estis tre sukcesa por nia organizo. Dank' al du grandaj someraj kongresoj, mi povis "reklami" la junularon pli multe kaj pli bone.

Unu el la du estis la Landa Kongreso, en West Hartford, inter la 17a kaj 20a de julio. Kiel mia unua Esperanta kongreso, tio ĉiam restos speciala momento.

Kelkaj aferoj surprizis min dum la Kongreso. Unue, surprizis min, kiom da personoj jam aŭdis pri USEJ kaj estis pretaj helpi nin! Mi antaŭe pensis, ke mi devus priskribi la ideon de usona junularo al ĉiu kongresano. Tamen, plejparte el ili venis informitaj kaj ideoplenaj. Al ĉiu el ili, kiu parolis kun mi eĉ iomete dum la Kongreso, mi kore dankas vin pro via subteno!

Alia surprizo estis la internacia etoso de la kongreso. Pro iu kialo, mi pensis, ke la Kongreso estus tute usona afero. Bonŝance, mi malĝustis. Mi renkontis tie homojn el pluraj landoj, inter alie Kroatio, Kamerunio, Uzbekio kaj Kolombio.

La neformala kunsido de USEJ dum la Kongreso estis la tria surprizo. Kiel neformala programero, mi pensis, ke aŭ neniu venus aŭ nenio okazus. Feliĉe, mi ne estis prava denove. Dank' al la ĉeesto (kaj ŝercemo!) de la kebekia aktivulo Normand Fleury, kaj aliaj homoj, la kunsido estis ĝuebla kaj tre amuza.

Mi vere ĝuis mian unuan landan kongreson, kaj devas gratuli la tutan lokan kongresan komitaton pro ĝia bona laboro! Jes, estas tre malfrua gratulo, sed estas gratulo ĉiukaze.

Mi vojaĝis poste el tiu internacia etoso al alia internacia etoso ... ĉi-foje, la amika rondo de la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis ĉijare inter la 07a kaj 14a de aŭgusto en Vraca, Bulgario.

La IJK, kiel mia unua internacia kongreso, estis speciala kongreso ankaŭ, des pli ĉar ĝi okazis en Bulgario. Malgraŭ la ŝercoj kaj antaŭjuĝoj, mi opiniis, ke Bulgario estas belega kaj fascina lando.

La Kongreso mem estis, kiel Lucille Harmon menciis en sia unua letero pri la

IJK, "nepriskribebla sperto" (kvankam mi provos priskribi ĝin iomete nun). La programo estis tiel varia kiel mi pensis. Plej plaĉis al mi la kulturaj programoj, kiuj montris al ni la pli misteran flankon de la kongreslando. Por la unua fojo, mi povis propraokule sperti la unikajn dancojn kaj kantojn de la bulgaraj popoloj.

Kompreneble, simple la okazo renkonti samideanojn el ĉie igas inda la tutan kvartagan vojaĝon tra Eŭropo. Preskaŭ ĉiam mi renkontis novajn gehomojn—dum la estrarkunsidoj, dum la okmejla piedmarŝo tra la kamparo, dum la frenezega (kaj laŭtega) tutnokta diskoteko. Mi tiel ŝatis la kongreson, ke mi eble ĉeestos la venontan en Suda Koreio. (Noto al Lucille: Pretigu vin mem! Mi antaŭvidas, ke en '94 pli da usonaj junuloj ĉeestos!)

Do, kio nun pri la venontaj projektoj de USEJ? Nu, unue ni intencas okazigi junularan tendumadon venontjare ĉirkaŭ Niagara Falls, NY. Kvankam ĝi estas nome "junulara tendumado", ni invitas ĉiun! Mi bonvenigas kaj atendas ĉies helpon pri tiu granda, sed ne neebla, ideo.

Kaj junularaj aferoj en la ELNA Kongreso? Tio dependas plejparte je la aktiveco de la junuloj en Kalifornio. Vere estus preskaŭ miraklo havi buntan junularan aranĝon tie. Tio ne signifas formalan kaj seriozan projekton—tute ne! Baki kukojn kune, ludi piedpilkon, krei rokmuzikan grupon ... ĉu tiuj ideoj interesas iun??

Ĉu io okazas en via regiono? Mi jam aŭdis plurajn bonegajn ideojn—kanti julajn kaj kristnaskajn kantojn publike en Esperanto en decembro, tendarojn de mezokcidenta/suda Usono ... faru tion! Se vi bezonas helpon aŭ konsilon, ne timu kaj skribu aŭ voku min.

Kaj aliaj ideoj kaj projektoj? Ili certe aperos en sekvontaj numeroj de *esperanto usa*. Se vi estas tiel entuziasma kaj helpema, ke vi volas scii pri la junulara movado eĉ pli frue (preskaŭ ĉiu estas tiel, ĉu ne?), kontaktu min! Mi atendas viajn leterojn kaj ideojn!

USEJ
624 Second Street
Lancaster PA 17603-5114
TEL: (717) 393-4273

the threats, the indentured servitude. What was unusual was that Hernandez—then 20 years old, unsophisticated, an undocumented alien from a small Mexican pueblo—told police and immigration authorities her story.

She was in a new country, with no money, no formal identification and no knowledge of the language. "He [the accused party] said I had to do what he said, because he paid for me," she said. "And I had no place else to go. The world was closed off to me. He could have cut me up in a million pieces, and no one would have known," she told a rape crisis worker later.

Finally, she summoned help from a neighbor, Lynn Smith. Hernandez approached Smith, using sign language and pointing to words in a Spanish-English dictionary.

[From an article by Carla Marinucci in the San Francisco, CA, Examiner, January 10, 1993.]

[Marching for Spanish]

Tens of thousands of people marched yesterday [in San Juan, Puerto Rico] to protest a bill to make both English and Spanish [Puerto Rico's] official languages.

Spanish is currently Puerto Rico's only official language.

The bill threatens "Puerto Rican nationality," educator Jose Ferrer Canales told a crowd in front of the Capitol building. Police estimated the crowd at 80,000 to 100,000.

Governor Pedro Rossello, leader of the pro-statehood New Progressive Party, is sponsoring the bill. It is virtually assured of passage because the legislature is dominated by pro-statehood lawmakers.

Language and culture is a sensitive issue for Puerto Ricans, many of whom are uneasy about what they see as the Americanization of the island. Spain colonized Puerto Rico and controlled it for 400 years before ceding it to the United States in 1898.

The march was organized by the small Puerto Rican Independence Party. Many of those attending carried the one-star, red, white and blue Puerto Rican flag.

In 1991, a Spanish-only law was pushed through the legislature by then-Governor Rafael Hernandez Colon, who was replaced by Rossello on January 2. Colon's Popular Democratic Party wants Puerto Rico to retain commonwealth status with enhanced autonomy.

[From an Associated Press article in the San Francisco, CA, Chronicle, January 25, 1993. Provided by Ionel Onet.]



RECENZE

Thurber, James: *La 13 horloĝoj*. El la angla tradukis Ralph A. Lewin: Berkeley: Eldonejo Bero, 1993. ISBN1-882251-04-0. 42 p. Prezoj ĉe ELNA: \$3.95 (nemembroj) / \$3.45 (membroj).

La ĝenerala intrigo estas ofta: Malbona princo kaptotenas ĉe si belan nevinon kun dolĉegaj trajtoj. Belaspekta juna noblulo venas gajni al si la belulinon. La malbonulo postulas plenumi taskojn neeblajn aŭ almenaŭ malfacilegajn. Ĉu nia heroo sukcesos? Oni ne rajtas malkaŝi tion, sed legantoj devas mensostreĉete tion diveni.

Jen rakonto en formo de fabelo, sed moderne verkita de la usona humoristo James Thurber, tre fama meze de la 20a jarcento. Nun ĝi aperas Esperante, kiel la plej lastatempa produktaĵo de la usona Eldonejo Bero.

Kvankam ĝi estas celita kiel infanlibro, ene troviĝas diversaj unikaj stilaĵoj de la aŭtoro frandeblaj de pliaĝuloj. Abundas aludoj kaj vortludoj, trafaj en la angla sed nur parte rekoneblaj en la Esperanta traduko. Ni ekzamenu diversajn specimenojn:

1. "the thorn Boar of Borythorn" (p. 24)

"la dorna apro de Aprodomo (p. 5)

La Esperantaj elektoj sufiĉe kaptas kaj la sonludojn kaj la signifojn.

2. "He will slit you from your guggle to your zatch" (p. 24)

"Li tratanĉos vin de la guglo ĝis la zaĉo." (p. 5)

Jen ekzemplo de pravigeblaj kaj necesaj neologismoj. La son-aludoj eventuale pli frapas al anglalingvuloj ol al aliaj. Ĉu en Esperantujo ni nuntempe trovas taŭgajn elektojn pli internaciajn? Ŝajne ne.

3. "O lordly Prince of Rags and Tags" (p. 25)

"ho lorda Princo de Ĉifonoj kaj Flikaĵoj" (p. 5)

La traduko kaptas la sencon, sed ne la rimon, kiu estas propraĵo de la monosilabariĉa angla lingvo.

4. "Hark, hark, the dogs do bark, But only one in three.

They bark at those in velvet gowns, They never bark at me." (p. 28)

"Aŭs- aŭskultu kiel bojas hundoj kiuj male ĝojas, kamparanojn malamante— sed neniam min ĝenante." (p. 8)

Kelkloke troviĝas tiaj rimaĵoj. Eble la plej malfacila tradukotasko: Kiel fidele kapti sencon kaj samtempe doni senton pri ritmo

kaj rimo. La Esperanta iugrade kaptas la sencon. La ritmo ne eblas kapti pro la malsamaj metrikoj, sed la anstataŭaĵo kontentigas.

5. "A wandering minstrel, I, ... a think of shreds and zatches." (p. 30)

"Mi estas vaganta minestrolo. ... Iu de ĉifonoj kaj zaĉoj." (p. 8)

La angla aludas faman kanton el la opereto *The Mikado*, far Gilbert & Sullivan. La aludo eble tute maltrafas ĉe nuntempaj junuloj eĉ en la angla, kaj preskaŭ certe en la Esperanta.

6. "The Blob will glup him" (p. 51)

"La bulo glupos lin!" (p. 14)

Miksaĵo de signifo-traduko kaj neologismo kiel tiu en #2, supre. Sed bulo ne entenas en Esperanto tiun pseŭdotimigan humuran signifon kiun havas **Blob** en la angla (helpe de iu sciencfikcia kinofilmo).

7. "Time is for dragonflies and angels.

The former live too little and the latter live too long." (p. 48)

"Pri tempo maltrankviliĝu libeloj kaj anĝeloj. Tiuj ĉi vivas tro longe, tiuj tro mallonge. (p. 13)

Pro interesa hazardo, la nomoj de la estaĵoj rimas en Esperanto, sed ne en la angla. Rimarku ankaŭ taŭgajn esperantigojn de la du frazoj: la unua laŭ la ĝusta senco kunteksta, la dua kun inversigo de la adjektivoj por logike akordi kun la Esperanta strukturo.

8. "Hark" kaj "Listen" (diversloke)

"Aŭskulto" kaj "Skulto" (diversloke)

Tiuj estas nomoj de helpantoj al la Dukaĉo. Angle la vortoj estas pli-malpli sinonimoj. En Esperanto, la sinonimeco prezentigas per sonludo. Interesa provo, eventuale sekvinda aliloke.

9. "A dehy who was terribly hobble,

Cast only stones that were cobble
And bats that were dig,
From a shot that was sling,
But never hit links that were bobble." (p. 85)

"Apud la kotega Nilo
Skvame-haŭta krokodilo
Vivis, griza reptilio
En soleca harmonio
Ĝis alvenis en aŭroro
Juna in-aligatoro—..." (p. 26)

La angla estas en la stilo limerika. Ĉi tie kaj la senco kaj la sento tute ŝanĝiĝas; kaj ial la kompleta Esperanta plilongas je 12 linioj. Poste sekvas alia limerikaĵo, simile traktita.

Librofine ni informiĝas, ke la tekston tralegis Gedoktoroj Marjorie Boulton, Juan Régulo Pérez, kaj David Jordan. Do, sufiĉa kontrolado de sufiĉe eminentaj esperantistoj. Ĉu la poem-adaptaĵoj ne iom respegulas la Boulton-an humuran stilon?

La tradukinto, Ralph A. Lewin, ni memoru kiel helptradukinton de Winnie-la-Pu antaŭ dudekplus jaroj. La tiutempa traduko-paro (Ivy Kellerman Reed kaj Lewin) renkontis similajn sed pli multajn malfacilaĵojn rilate vortludadon kaj poem-adaptadon. Bontalente, ili plejparte venkis. La samon oni povas diri pri la nuna verketo.

Mi trovis iun detaleton ĝena en la litertipo. Fojfoje mi unuavide mislegis la kombinon "rn" kiel "m". Ekz.: "Zorn de Zorna" kiel "Zom de Zoma". Same okazis de tempo al tempo ĉe ordinaraĵoj. Eble malgranda alĝustigo en la interspaco (angle: *Kerning*) solvus la problemon.

La libron oni povas ĝui kiel humurecan fabelon. Sed ĝi pli gravas kiel studilo pri la tradukarto. Kiom kaj kiamaniere traduko kapablas fidele respeguli la originalon. En kurso aŭ kurseto, aŭ per memstudo, ĝi sufiĉe mallongas por esti traktata tiel sen tedo aŭ eniĝo.

R. Jaderstrom

***Ez-Aha: The Sacred Texts of the Vhnda-Mas'in Culture of Anatolia*. Tradukis Pastro Billy Sol Rajguptastein. 1992: Humming Crystal Publications. 41 paĝoj.**

Post la *Sankta Biblio*, la *Nobla Korano*, kaj la *Instruoj de Budho*, nun haveblas parto de la sanktaj skribaĵoj de la Eklezio de la SubGeniulo kaj de ties apostolo J. Bob Dobbs, kies vizaĝo estas preskaŭ same tiel konata tra la mondo kiel tiu de Ozzie Nelson, al kiu ĝi iom similas.

La originala teksto estis en "la" anatolia lingvo, kiun oni devis komposti por ĉi tiu eldono uzante specialan literaron, silabaron, aŭ signaron. Tiu originala teksto aperas sur la maldekstraj paĝoj; sur la dekstraj troviĝas la anglalingva kaj Esperantlingva tradukoj farde Pastro Billy Sol Rajguptastein de la Templo de la Poreterna Lacerto.

Simple dirite, kiel povas iu ajn versaĵo el antaŭaj religiaj libroj pretendi eĉ egalan kvaliton kun tiaj fortaj propozicioj kiel "Ilia kanajlaro pretendos la mantelon de la veraj disciplinistoj, kaj la neelektitoj havos paroksismon de histerio"? (Connptions:8)

La libro, kiu aperis en limigita eldono (40 ekz.), ne estas havebla ĉe la ELNA libroservo.

Don Harlow



ESPERANTAJ VOJAĜOJ
VOKAS VIN

Lusi Harmon will visit Seoul and environs to find appropriate housing and plan a post-UK excursion. A report will follow in the next issue of *esperanto usa*.

Antaŭkongreso de 79a UK
(neoficiala) 15-22 julio
Sacramento, Kalifornio. Programo inkluzivos prelegojn, distraĵojn, kaj ekskursojn dum la ELNA-kongreso, plus ekskurso al San Francisco.

79a Univ. Kongreso de Esperanto
23-30 julio 1994
Seŭlo, Koreio

Internacia Junulara Kongreso
30 jul-6 aŭg, Chonan, Koreio

Post-UK ekskurso
30 julio-8 aŭgusto

famous Paella chef and his busy assistants cooked 400 pounds of rice, 440 pounds of chicken, 88 pounds of duck meat, 88 pounds of tomatoes, 22 pounds of salt, 28 quarts of olive oil, 132 pounds of rabbit, 45 pounds of snails, 450 pounds of onions and other vegetables, a pound of paprika, 10 grams of saffron, and 106 gallons of water; all fired by 1325 pounds of orange-tree firewood. The UK itself was, as usual, a 3-ring circus of artistic, cultural and administrative meetings and shows, an unforgettable experience.

The EVS post-UK ekskurso took 23 Esperantists from 8 countries on a fascinating and educational 9-day journey through northern Spain and Portugal, ending with a fantastic banquet and meeting with local Esperantists.

Our six delegates to the Internacia Junulara Kongreso in Vraca, Bulgaria, had a great time, made rewarding Esperantist friendships and showed considerable ingenuity in getting home despite a rail strike in Romania. They'll report on this later.

Australian Summer Courses
Jan. 10-22, 1994
Adelaide, Australia

! Esperanto's 25th Year !
San Francisco State University
June 27-July 15
three-week multilevel courses.
The best in the world.

University of Hartford
Esperanto workshops - dates TBA.
Dr. Humphrey Tonkin, Director.

ABOUT 1993

A happy group of Esperantists from five countries enjoyed a brief antaŭ-kongreso arranged by Esperanto Vojaĝservo in Barcelona this July, traveling by train along the Mediterranean coast to the 78th World Congress of Esperanto in Valencia.

And what a beginning in Valencia! The city fathers of Paella Valenciana for all 2000 Kongresanoj at a beach resort north of town. The paella was cooked in one huge "pato" almost 14 feet in diameter, in which a

Esperanto Vojaĝ-Servo
6104 La Salle Avenue
Oakland CA 94611
[510] 339-2001

**USE YOUR ESPERANTO TRAVEL
SERVICE FOR ALL YOUR
TRAVEL NEEDS!**

ELNA

President: Donald J. Harlow (1996), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187
Vice President: Sherry Wells (1996)
Secretary: Ellen Eddy (1995)
Treasurer: John B. Massey (1994)

Other Board Members: William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994), Thomas Eccardt (1995), D. Gary Grady (1995), Rochelle Grossman (1995), Dorothy Holland-Kaupp (1996), Derek Roff (1996), David B. Richardson (1996)

Commissioners and Chairs: Don Coleman (Local Clubs, Nominating), John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), Angela Harlow (Kongresoj), Lucy Harmon (Travel Affairs, Instruction), Doroteo Holland (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course), Sherry Wells (Publicity), David Wolff (Publishing)

Director, Central Office: Miko Sloper
Vice-Director, Central Office: Ionel Onet

ELNA Archivist: Ionel Onet
Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1994

Regular	\$30
Family	\$45
Youth (under 27)	\$15
Limited income	\$15
Sustaining	\$60
Life	\$600

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

UEA dues 1993

Member-Guidebook only (MG)	\$ 9.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$22.00
Member-Subscriber (MA)	\$54.00
Societo Zamenhof (additional)	\$108.00
Subscription only to Esperanto	\$32.00
Subscription only to Kontakto	\$18.00
Life Membership in UEA	\$1350.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1993(5) of Esperanto U.S.A. is Nov. 25, 1993

Esperanto U.S.A.
Volume 29, No. 3
ISSN 1056-0297
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (510) 653-0998
For Info: (800) 828-5944
Fax: (510) 653-1468
Internet: elna@netcom.com
Editor: Don Harlow
Telephone: (510) 222-0187
Internet: donh@netcom.com